# N I A V O Ĉ O

Organo de Madrida Esperanto-Liceo
Atocha 98-4º.28012 Madrid
. lunde vespere (91) 5 30 87 98 * fax (91) 5 71 08 52
Redaktas kaj eraras Lupe Sanz APRILO 1994


**NOVA ELDONO DE PROPAGANDA FLUGFOLIO**

Kune kun Nia Voĉo ni sendas kopion de la nova eldono, kun aktualigitaj datumoj, de la tre konata propaganda tri-faldita broŝuro. Ĝi havas resumon de la lingvo esperanto, inkluzive de gramatiko, oficialaj rekonoj kaj la adresoj de diversaj esperantaj grupoj de Hispanio. MEL bonvenigas informojn pri eraroj aŭ pri grupoj kiuj mankas aŭ malmankas (ne bone funkcias kaj kies adreson oni ne devas aperigi)

**SEGOVIO**

Manolo Parra, la 7-an de mardo, en la salono de Caja de Ahorros parolis pri la "Internacia lingvo esperanto: Kio estas?. Kia estas?. Ĉu utilas?". La prelego estis anoncita en loka ĵurnalo "El adelantado" kiu ankaŭ publikigis novaĵon, senditan de César, pri la lasta rezolucio de Unesko favore al esperanto.

**"HELECO" BRILAS**

Jes, las lasta numero de la revuo de Astura Esperanto-Asocio estas imitinda. Temas pri dulingva eldono pri UK-Valencio. Nek "Boletín" nek "Valencia luno" atingis la nivelon de la astura numero dediĉita al kongreso. Gratulojn!!

**INTERNACIE**

* Litova Esperanto-Asocio inaŭguris domon kiu apartenis al Aleksandro Zilbernik, bopatro de L.L. Zamenhof kaj kiu _in ricevis de la urbodomo de Kaunas.
* Kiel kutime la lasta scienc-fikcia romano de Harry Harrison "La rustrezista _talrato vekantas" (angle, "The stainless steel rat sings the blues") havas tutpaĝan anoncon pri Esperanto, lingvo kiun lia heroo, Kim de Griz, parolas kiel denaskulo, ankaŭ aperas adreso de landaj asocioj. Bedaŭrinde ankoraŭ ne aperis hispana versio.
* Venezuela E-Asocio kunlaboras kun internacia E-instituto (Hago) por realigi E-kurson televiduzeblan en _iuj landoj.
* En Venezuelo ankaŭ laboras Fernando de Diego en la nova kaj kompleta vortaro hispan-esperanta kun vortoj el ĉiuj partoj de la hispan-parolanta mondo.

**RENKONTIĜO EN MADRIDO**

La 7-an de marto okazis en la sidejo de MEL kunveno kun valencianoj: Augusto kaj Alicia. Li proponis, por profiti la ondojn de la UK-Valencio en amas-medioj, organizi fakan kaj seriozan seminarion pri iu ajn aktuala temo kun ĉeesto de fakaj esperantistoj. **Provizore** oni elektis jenan: temon "Rasismo kaj ksenofobio", loko: junulara kaj malmultekosta restadejo en Benicassim (Castellón), dato 5-11 septembro. La celo estas fari ĝin jare.

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Ĉiu-lunde ni kunvenos,ekde la 18.30 horo, en MEL, Atocha 98-4º
Marde/ĵaŭde, ekde la 18.00 h. ĝis la 20,30 h funkcias HEF-CO (Rodriguez S.Pedro 13- 3º-7). Aliaj tagoj uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson: (91) 446 80 79

Venontaj programoj, lunde je la 19.00h en Atocha 98-4º:

18-an de aprilo.- "Esperanta ortografio". Parolado de Luis Ojer.
16-an de majo.- "Gigantoj de Madrido". Prelegas Carmen Suárez

**KONGRESOJ**

23-24a de aprilo en Castellón. Kongreso de Valencia Esperanto Federacio
16-21a de julio en Málaga, 53a Hispana Kongreso de Esperanto

**PREPARU MALAGAN KONGRESON**

En Malago okazos kunveno de reprezentantoj de Hispanaj esperantaj grupoj por pridiskuti celojn, planojn kaj estonton de HEF kaj de la hispana movado, legu lastan numeron de "Boletín" kaj sendu komentariojn al HEF-Sekretario. ESTAS GRAVA

**EKSTERLANDANO EN MADRIDO**

Dum mardo vizitis Madridon S-ro Mario Lima, kuracisto el Brazilio kiu vizitis nian sidejon kie li parolis pri la esperanta movado en sia lando.

**NOVA FORTO VENAS AL MEL**

Ekde mardo laboras en Madrido, Santiago de Bilbao. Li venas lunde al nia konversacia rondo kaj enmetas novan forton tre necesan en la Liceo. Ni bonvenigas lin kaj deziras bonan restadon en Madrido.

**HEF ANGULO aŭ MEL sugestas**

MEL kutime sendas al HEF alvokojn pri subvencioj, informojn pri kulturaj asocioj, ktp. Ĉu estas "strategia plano" de HEF uzi ĝian publikan utilecon por atingi profitoj de oficialaj instancoj?.
Jam ekde la pasinta jaro MEL oferis sian eksperton al HEF por prezenti "serioze" ekonomian kaj aktivaĵan informojn. Ĉu faros tiel ĉi-jare?.

**AĈETU "Esperanto: fenómeno de la comunicación", la plej aktuala libro hispan-lingve pri la internacia lingvo. Prezo 1.300 ptjn (inkludas IVA-on kaj sendokoston al Hispanio). 20% rabato por pli ol 5 ekzempleroj. ANTAŬPAGO NECESE, pere de POŜTĜIRO, al Esperanto-Liceo de Madrid. Atocha 98-4º. 28012 Madrid. NE SENDU ĈEKON**